

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ elokuu ♦ aŭgusto ♦ 4/2006



*Filatela ekspozicio en Källkullen, Kimito sabate la 8an de julio 2006. Anna-Liisa Ali-Simola, Martti Vihanto kaj Cao Xionglin. (Ks. artikkele s. 30)*

## **Atilion oppitunnit innostivat, s. 5-8, 28**

**Irja Klemola, p. 12 ♦ Aŭtunaj Tagoj & Esa Toivola, p. 19-22**  
**Festivalo Arta Lumo – la unua informilo sur mezaj paĝoj**

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo:** ✉ eaflehti@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ ef\_redakto@surfeu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki. ☎ (09) 587 6738 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Anna Ritamäki*

**Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 18 e/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 12 e.

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

**Prenumerationer, adressförändringar:** EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

**Pankkitili/Bankkonto:** Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 400

## Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Anna Ritamäki*

Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ✉ (02) 423 246 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

**Sekretario/Sihtööri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:**

tuomo.grundstrom

*Tuomo Grundström*, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ (050) 5180 590, (02) 822 7779 ✉ @lailanet.fi

*Taneli Huuskonen*, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli@poczta.onet.pl

*Markku Saastamoinen*, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (050) 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@jippii.fi

*Börje Eriksson*, Keiturintie 274, 16510 Luhtikylä. ☎ (03) 785 1191 ✉ esperarto@phnet.fi

**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**

*Timo Pirinen*, Rinnetie 11-13 D 32, 06650 Hamari. ☎ (040) 592 1756 ✉ timo.pirinen@gmail.com

*Raita Pyhälä*, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ saliko@kase.fi

*Marjaliisa Parpala*, Utinkatu 45 B 7, 45200 Kouvola. ☎ (040) 717 4521

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** Sampo 800017-230825.

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:**

Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

**Oficejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**Internet:** <http://www.esperanto.fi>



## Fondaĵo atentinda

La Finna kultura fondaĵo (Suomen kulttuurirahasto) mastrumas fondaĵon, kiu eksplicite mencias kiel sian celon antaŭenigi universitatnivelaĵn studojn de espe-

ranto kaj tradukadon de finna literaturo al esperanto. Krome ĝi subtenas muzikarton kaj literaturesploradon. La fondaĵo Terttu Österman disdonas ĉiun duan jaron. Pasintfoje 48 000 euroj estis dividitaj inter kvar ricevantoj. Neniu tiam ricevis monon ligitan al esperanto, kvankam la fondaĵo laŭ la reguloj nature donus preferon ankaŭ al esperantorilataj muzikarta kaj verka laboroj. Esperanto-Asocio de Finnlando scias nur pri unu peto ligita al esperanto ensendita 2004 (por tradukado de literaturo). Ni supozas ke la ligo inter la peto kaj la persona fondaĵo ne estis atentata.

Sojle de la jubilea jaro mi volas atentigi pri la grava potencialo, kiun tiu ĉi fondaĵo donas por kvalita agado ligita al esperanto – sekvajare kaj estontece. Ĉu la mono estos disponigita por laboroj ligitaj al esperanto estas afero, kiu dependas unuavice de ni mem. Tial ni celas bonan prepariĝon al la disdivido 2007. EAF pretas kunordigi la prepariĝon de la petoj.

Bonvolu atenti la sekvajn konsiderojn:

– Ni estu pli ambiciaj! La kaŭzo por nedono ne estu la manko de bonaj esperantorilataj petoj. Ni celu al granda kvanto da petoj kaj petu sumojn konsiderindajn. Ne nur estu petoj nome de EAF, sed ankaŭ privatuloj kaj aliaj asocioj faru subvencipetojn. Laborstipendioj povas ebligi tre valoran agadon.

– Ni kuraĝe proponu realigon de niaj revoj! Tial mi instigas vin pripensi bonajn, interesajn kaj altkvalitajn planojn kongruajn al la fondaĵaj

celoj! Ne mankas al ni artistoj kaj aliaj kapabloj.

– Konatiĝu kun la subvencipeta gvidilo [www.skr.fi](http://www.skr.fi), sed ne malkuraĝigu legante. Prezentu al ni ideojn ankaŭ se vi ne certas ĉu la ideo kongruas kun la celoj. Ni helpos vin esplori la eblecojn.

– Ideoj pri petantoj kaj planoj estu skizitaj jam dum aŭgusto por ke estu multflanka materialo sufiĉe frue antaŭ la limdato. Tio gravas por la antaŭlimdata persona kontakto kun la kultura fondaĵo. Mi estas la kunordiga kontaktpersono en EAF, sed vi povas diskuti viajn ideojn kun iu ajn estrarano.

Petoj estu ensenditaj sekvajfoje en oktobro 2006. La informo pri la ricevo de la mono venas sekvafebruare.

*Anna Ritamäki*


## Terttu Östermanin rahasto

Perustuu farmanomi Terttu Östermanin lahjoituksiin. Edistää säveltaiteita ja kirjallisuuden tutkimusta, yliopistotasoisia esperanton opintoja ja tutkimusta sekä suomalaisen kirjallisuuden kääntämistä esperantoksi. Jakaa joka 2. vuosi.

Apurahat 2005: Fil. kand. Sirpa Hietanen, Helsinki, pienten, yksityisten musiikkiorganisaatioiden menestymisen ja eloonjäämisen strategioita Pohjois-Euroopassa käsittelevään tutkimukseen (8.000), Säveltäjä Asko Hyvärinen, Helsinki, sävellystyöhön (16.000), Fil. lis. Milla Peltonen, Tampere, Hannu Salaman jälki-realistista romaaniutuotantoa käsittelevään väitöskirjatyöhön (16.000), Sinfoniaorkesteri Vivon tuki ry, Riihimäki, orkesteritoimintaan (8.000).

Lähteet: Suomen Kulttuurirahasto, Apurahat, Hakuopas 2005 (haku lokakuu 2004) ja Apurahat nimikkorahastoittain:

<http://www.skr.fi/apurahat/jaerah2005.html>



## Daŭropova esperantismo?

Antaŭ multaj jaroj, kiam naturprotektemo iĝis ĝenerale konata koncepto, estis ia modfenomeno, ke oni multe parolis pri daŭropova evoluo kaj

proponis diversajn iom modifitajn versiojn pri la koncepto, aldonante siajn proprajn preferojn al la baza ideo pri homaro vivanta en ekvilibro kun la cetera mondo.

Mi ne tre ĝojiĝas pro vidi, ke la UK nun proponas sian propran modifaĵon, kie oni celas ligi lingvan kaj kulturen diversecon al daŭropova evoluo. Mi neniam vidis tre grandan analogiecon inter biologia diverseco en naturmedio kaj lingva diverseco en homa kulturmedio.

Estas bone, se (ankaŭ) esperantistoj pledas kontraŭ polucio kaj detruado de la medio, sed nur tial, ke ĝi estas en ĉiu kazo racia (kaj eĉ nepra) celo por la homaro, ne tial, ke Esperanto mem indus esti parto de la sama evoluo.

*Mikko Mäkitalo*

### **La 91a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Florenco (Italujo) kun 2209 partoprenantoj el 62 landoj,**

*konstatinte,*

- ke la Jardeko de Edukado por Daŭropova Evoluigo 2005-2014 estas grava kadro por iniciatoj cele al evoluo kiu estu socie dezirinda, ekonomie vivkapabla, kulture taŭga kaj ekologie daŭrigebla,
- ke nuntempe ekzistas gravaj minacoj kaj al biodiverseco kaj al kultura kaj lingva diversecoj, pro la reciproka dependeco inter la homo kaj la naturmedio,
- ke la nuna superrego je monda skalo de unu lingvo havas maltrankviligajn ekonomiajn, sociajn kaj edukajn efikojn koncerne daŭropovecon, lingvan ekologion kaj la rajton je komunikado.
- ke la strebado de la Esperanto-movado al lingva demokratio kongruas kun la valoroj de transnacia edukado celanta informitajn, aktivajn civitanojn kiuj estu kapablaj kritike kompreni sin mem kaj la ĉirkaŭan mondon por partopreni la evoluprocedon respondece kaj solidare.

*Alvokas*

la Esperanto-komunumon aktive engaĝiĝi en la agadoj kiuj, sur diversaj niveloj, strebas antaŭenigi praktikojn koherajn kun la principoj de la bezonata ŝanĝoprocezo, kaj utiligi siajn lingvon kaj retojn serve al tiuj klopodoj.

*Rekomendas*

al la Estraro de UEA doni al la ĉi-rilataj problemoj pli da atento en estontaj kongresoj kaj agadoj, partnere kun neesperantistaj organizaĵoj.

*Konfirmas*

la pretecon de la Esperanto-komunumo kunlabori kun Unesko kaj aliaj organizaĵoj cele al tutviva edukado por paco, socia justeco kaj kultura diverseco, kaj atentigas ilin pri la lingva aspekto de daŭropova evoluigo.

*Florenco, 2006. 08. 04*

## Provlecionoj de Atilio en Turku kaj Hämeenlinna

Antaŭ la kursosemajno en Valamo la ĉefinstruisto Atilio Orellana Rojas estis gasto de Esperanto-societo en Turku (EST) kaj renkontiĝis kun lokaj aktivuloj en Hämeenlinna.

En Turku la 29an de junio estis aranĝita provleciono en kafejo Café Art, la renkontejo de lokaj klubanoj ek de aŭtune. Pri la provleciono aperis anoncetoj kaj artikoloj en lokaj gazetoj surbaze de gazetaraj komunikoj de EAF/EST, krome informfolioj de EST estis i.a. en la anoncotabulo de la ĉefa biblioteko. Krom membroj de EST al la provleciono venis kelkaj personoj allogitaj de la anoncoj, entute ĉeestis 14 personoj. Ĉiuj ĝuis la afablan instruadon de Atilio kaj certe la novuloj lernis multon. Legu pli detale en la raporteto de EST-ano Merja Uotila.

En Hämeenlinna la 30an de junio estis anoncita publika aranĝo en kafejo Sokerileipomo Suominen. La ĉefa kunordiganto en Hämeenlinna estis Markku Sarastamo. En la programo estis provleciono de Atilio kaj prelego de EAF-prezidanto Anna Ritamäki pri lingvopolitikaj aferoj ene de Europa Unio.

Aperis du pagitaj anoncoj en lokaj gazetoj.

De lokaj amaskomunikiloj venis al la aranĝo la ĉefa loka gazeto Hämeen Sanomat kaj regiona YLE-radiokanalo Radio Häme. Artikoloj aperis bonege kaj en Hämeen Sanomat kaj en la alia gazeto Kaupunkiutiset de Hämeenlinna, ankaŭ en radio aŭdeblis intervjuoj (legu pli detale en *Muut lehdet* -artikolo de Jukka Nojonen).

La aranĝon partoprenis 15 personoj, kiuj bonege amuziĝis dum la provleciono, kiel vi vidas de la bildo. Ankaŭ la prelego de Anna vekis intereson kaj viglan diskuton pri la rolo de lingvoj kaj eblecoj de Esperanto en EU.

Vespere la vizitantoj kune kun hämeenlinnaanoj havis eblecon vespermanĝi, saŭni kaj babili en saŭnadometo apud la lago Alajärvi. Estis afabla kunestado kun bongustaj manĝoj preparitaj de Talvikki Saarenkari, varma saŭno kaj ebleco naĝi en apuda lago. Komuna kantado, vigla diskuto kaj eĉ futbalo apartenis en la vespera programo.

Ni vizitantoj, kiuj tranoktis en Hämeenlinna (Atilio, Teuvo kaj mi) daŭrigis la vesperon ĉe Kati Lindell, kiu kun edzo afable invitis nin. Sekvan tagon ni vizitis la infanhejman muzeon de Sibelius en la centro de Hämeenlinna, kie ni estis afable akceptitaj de la muzea oficisto.

Dankon al ĉiuj hämeenlinnaanoj pri la bonega aranĝo! Sukceson al via studado, kiun vi laŭ nunaj scioj januare povos daŭrigi en la loka popola instituto de Vanajavesi. La aŭtunon vi kompreneble studos en studgrupoj kiel ĝis nun.

*Tiina Oittinen*

*Atilio Orellana Rojas ludigas la partoprenantojn, plej antaŭe Kati Lindell kaj Teuvo Alavillamo.*



## Valamo-kurso 3.-7.7.2006 – la plej internacia ĝis nun

La ĉi-jara kurso, la 7a sinsekve, estis ĝis nun la plej internacia. De la kursanoj 2 venis el Francio, 1 el Svedio, 5 el Finnlando kaj 4 el Ĉinio. La ĉefinstruisto estis denove Atilio Orellana Rojas el Argentino/Nederlando. La kursogvidanto estis la EAF-sekretario Tiina Oittinen, kiu ankaŭ agis kiel helpinstruisto. Ĉiuj kursanoj jam havis iujn bazajn sciojn pri Esperanto. Ili dividigis en du grupoj laŭ siaj lingvoscioj kaj intereso kaj estis instruitaj kaj gvidataj de ambaŭ instruistoj.

La kursosemajno komenciĝis alimaniere ol kutime, ĉar el la regiona televida kanalo venis redaktoroj por fari mallongan raporton en regionaj novaĵoj. Ili filmis kaj la instruadon kaj la konatiĝan rondiradon, kiun ĉiĉeronis esperante Jukka Laaksonen. Krome la instruistoj kaj kursanoj estis intervjuitaj.

Dum la libertempa parto de la kurso ni krozadis surŝipe en la lago Juojärvi, migris al la kruco de migranto kaj vizitis la monaĥejan tomb-

ejon. Merkredvespere ni ekskursis al la proksima fumsaŭno kaj jaŭde havis la festan vespermanĝon laŭ Valamo stilo. Unu el niaj ĉinaj partoprenantinoj prezentis kanton dum la festa vespero, aliaj programeroj estis teatraĵeto kaj muzikado.

La kursanoj informiĝis ankaŭ pri eventoj de Esperantio kaj estis bonvenigitaj al venontaj Esperanto-aranĝoj en Finnlando, kiuj i.a. estos Aŭtunaj Tagoj de EAF en Haukipudas kaj Festivalo Arta Lumo en Kuopio. Venontjara kurso okazos 23.-27.7.2007 kun samaj ĉefinstruisto kaj kursogvidanto. Laŭbezone la kurso havos ankaŭ duan tuttempan instruiston. Lige al Festivalo Arta Lumo estos aranĝata antaŭekskurso al Valamo 26.-27.7. Dum la ekskurso oni konatiĝos kun la monaĥejo, ĝuos festan vespermanĝon laŭ Valamo stilo kaj komune ŝipvojaĝos de Heinävesi al Kuopio.

*Tiina Oittinen*



*Atilio instruas ĉi-jarajn kursanojn en Valamo. Ĉirkaŭ la tablo: Wang (dorse), Tjeri, Anna-Maija, Anne, Yi, Cao, You kaj Anne. (Foto: Raimo Tullila)*

# Kansainvälistä tunnelmaa

## Valamon esperantokurssilla 3.-7.7.2006

Tämänkesäinen Valamon esperantokurssi oli tähän mennessä kansainvälisin: osallistujia oli Suomesta, Ruotsista, Ranskasta ja Kiinasta. Pääopettajana oli jälleen argentiinalais-hollantilainen Atilio Orellana Rojas ja kurssivastaavana sekä apuopettajana Suomen Esperantoliiton puolesta toimi Tiina Oittinen. Kurssilaiset jakautuivat kahteen ryhmään aikaisempien tietojensa mukaan, tällä kertaa kaikilla kurssilaisilla oli jonkin verran perustietoja esperantosta. Molemmat opettajat opettivat ja ohjasivat kumpaakin ryhmää.

Ensimmäisenä kurssipäivänä oman jännityksensä toi Itä-Suomen alue-TV:n vierailu. Opetuksen lisäksi filmattiin myös Jukka Laaksosen vetämää esperantonkielistä tutustumiskiertokävelyä sekä haastateltiin opettajia ja kurssilaisia. Toinen jännityksen aihe kurssin alussa oli kiinalaisten saapuminen: koko päivän odotus päättyi maanantaina noin puoli yhdeksän illalla, jolloin 4-henkinen ryhmä pitkän matkan jälkeen saapui onnellisesti Valamoon.

Kurssiviikon 25 oppitunnin lisäksi esperantoa oppii myös vapaa-ajan ohjelman aikana. Varsinkin kansainvälisellä kurssilla keskustelu sujuu yhteiskielellä myös ruoka-aikaan sekä tietenkin retkillä. Yhteisissä illanvietoissa ohjelma – luennot, selostukset samoin kuin yhteislaulut – tapahtuu enimmäkseen esperantoksi. Näin myös tällä kertaa, jolloin opiskelijat aktiivisesti osallistuivat keskusteluun ja ohjelmaan.

Onnistuneen kurssiviikon jälkeen oli mukava toivottaa kurssilaiset tervetulleiksi Suomen Esperantoliiton seuraaviin tapahtumiin. Ensi vuonna Valamon esperantokurssi järjestetään myöhemmin heinäkuussa kuin aiempina vuosina, jotta se liittyy sujuvasti Arta Lumo -festivaaliin Kuopiossa. Kurssiviikko on 23.-27.7.2007 ja Atilio on jälleen lupautunut pääopetta-

jaksi. Kurssivastaavana on nytkin Tiina Oittinen ja tarvittaessa mukana on myös toinen päätoiminen opettaja.

Arta Lumo -festivaaliin liittyvä etukäteisretki järjestetään Valamoon 26.-27.7. Ohjelmassa on yhteinen juhlaillanvietto kurssilaisten kanssa, tutustuminen luostarin alueeseen ja risteily Heinävedeltä Kuopioon.

Lisätietoja Suomen Esperantoliitolta, yhteystenkilö: Tiina Oittinen (yhteystiedot s. 2).

### Kurssipalautetta – Komentoj pri la kurso

Kelkaj kursanoj afable skribis al Esperanta Finnlando pri la kursospertoj. Jen du ekzemploj:

– Esperantokurssi oli mielestäni kaikin puolin hyvin toteutettu. Vastasi odotuksiani. Varsinkin tällaiselle aloittelijalle oli hyväksi kuulla paljon puhuttua kieltä. Tosin en siitä vielä paljoakaan ymmärtänyt, jotain kuitenkin. Sain taas uutta intoa jatkaa esperanton opiskelua.

Kurssilla vallitsi välitön ja ystävällinen ilmapiiiri. Mukava oli viettää myös vapaa-aikaa yhdessä illanviettojen ja retkien merkeissä. Valamo kurssiympäristönä on aivan vertaansa vailla. Aion tulla sinne toisenkin kerran esperantoa oppimaan.

*Kun amikaj salutoj  
Anna-Maija el Jyväskylä*

– Ni aparte ŝatis la agrablan kaj internacian etoson de tiu staĝo, kaj ankaŭ admiris la paciencon kaj afablecon de la kursgvidantoj. Dankon al ili kaj al Jukka, de kiu ni multe lernis pri la monaĥejo de Valamo.

*Tjeri kaj Anne el Francio*

## Nopeaa oppimista

Turun Esperantoyhdistys järjesti 29.6.2006 Cafe Art -kahvilassa esperanton näyteoppitunnin cseh-menetelmän mukaan. Opettajaksi oli saatu turkulaisille esperantisteille jo ennestään Valamon kursseilta tutuksi tullut kansainvälisen esperanto-instituutin johtaja Atilio Orellana Rojas Hollannista.

Keskiaikamarkkinoiden hyörintästä oli joukko henkilöitä kerääntynyt kahvilan kabinettiin. Kaikki tempautuivat mukaan eloisaan esitykseen. Itsensä esittelyn jälkeen opittiin konkreettisesti osoittamalla mm. esineitä ja värejä. Seinällä olevissa kukkatauluissa olikin paljon värejä. Välillä noustiin ylös ja piirissä opeteltiin päätä, kädet, napa ja polvet esperantoksi. Hauskassa leikissä sai samalla liikuntaa. Sitten taas

istuttiin ja opettajalle sai tehdä kysymyksiä. Jorma Ahomäki toimi hienosti tulkkaajana.

Syksyllä alkavasta esperantokurssista kertoi Tiina Oittinen. Tunti oli pian lopussa, mutta hyvän esimerkin toiston hyödystä opetuksessa antoi Mauri, joka lähtiessään osoitti mustaa tuolia opettajalle ja sanoi: ”Nigra seĝo!” Opetus oli jäänyt mieleen.

Tavataan taas Auralan kansanopistossa Satakunnantiellä syksyllä.

*Merja Uotila*

*Esperanto-societo en Turku organizis provlecionon en Cseh-metodo. Instruisto estis Atilio Orellana Rojas el Nederlando.*



*Atilion näyteoppituntia kuuntelevat (vas.) Matti Jaakkola, Veikko Tikkanen, Hilikka ja Osmo Kaplas, Anja Launiainen, Mauri Tanskanen ja Tapio Markkula. Kuvasi Merja Uotila.*



## BET en la insullando Saaremaa

La 42a BET (Baltaj Esperanto-Tagoj) okazis 4.-8.7. 2006 en Kuressaare, la ĉefurbo de la estona insulo Saaremaa. Kvankam ĉefurbo, Kuressaare estas kvieta loko kaj gardas en sia arkitekturo la ĉarmon de pasintaj jarcentoj kaj de lignaj unufamiliaj domoj kun bonege prizorgataj domoj. (Ankaŭ neglektataj domoj kaj parceloj videblas.) Pro turistoj la loĝantaro (15 mil) duobliĝas somere; pro la insula izoliteco kaj manko de salajrata laboro la loĝantaro malpliĝas. Al BET la plej grandaj grupoj nun venis de Estonio, Finnlando kaj Latvio, sed aliĝis – kvankam ne reale povis partopreni – ankaŭ hispanoj kaj japanoj. La oficiala partoprenantaro nombris 137 el 11 landoj. Oni kunvenis en la ĉambroj de la lernejo Saaremaa Ühisgümnasium kaj tagmanĝis en la lerneja manĝejo.

### Distra programo

En la unua vespero okazis diservo en luterana preĝejo kaj interkona vespero en la aŭlo de la lernejo. Bonhumura kaj lerta akordionistino multe plaĉis al la publiko, kvankam estis tro varme por vigle danci. Alivespere nin distris muzikistoj, popoldancistoj, kantistoj kaj deklamistoj, ofte koncertis la 8-membra gejunula ensemblo "Animo" el Latvio kun sia direktorino Austra Pumpure.




*Urbestro s-ino Urve Tiidus salutas en la Solena Malfermo*

En la ekskursita tago ni per du aŭtobusoj rondveturis la tutan insulon en 9 horoj kaj ŝvitiga varmego. Ni vidis belan florantan naturon (galiuoj, ulmarioj, lekantoj, cejanoj, orkidoj k.a.), foliarbarojn kaj vente torditajn pinojn, fragmitarojn, plaĝojn, maron, rondan profundan lageton faritan de meteoroido antaŭ supozeble 7500 jaroj (fakte ĉirkaŭe troveblas 8 aliaj meteoroidaj kavoj), paŝtejojn kun verdegaj juniperoj, ventmuelilojn, malgrandajn ŝtonpreĝejojn, musko-kov-

*La ensemblo Animo*





*Sakari Kauppinen prelegis pri la ĉefaj fazoj en historio de Finnlando.*

ritajn ŝtonbarilojn, kamparajn dometojn. La tuta insulo ŝajnas kvazaŭ nacia parko. Ni aŭdis multon pri la estonaj historio, naturo kaj vivmaniero. En alia tago ni piede ekskursis al la kastelo de Kuressaare, siatempe episkopa loĝejo kaj nun turisma vidindaĵo kun artekspozicioj, muzeoj, kafejo. Por 2-eŭra bileto oni povis atesti kolorplenan mezepokan turniron de 6 rajdantaj kavaliroj.

### **Lerniga programo**

Ĉiutage oni povis aŭskulti tri horojn da prelegoj, preskaŭ sen paŭzoj, en varmega klasĉambro sur malkomfortaj lignaj benkoj. La temoj estis interesaj: popoloj de la Balta maro, estonoj en la finno-ugraj gentoj, Estonio hodiaŭ, evoluo de Saaremaa, estonaj kuraclokoj, naciaj kostumoj en la estona insularo, historio de gepatralingva edukado en Estonio, nuntempa Latvio, nuna sveda socio, turnpunktoj en finna historio (prelegis Sakari Kauppinen), harmonio inter homo kaj naturo, rememoroj pri E-juneco kaj pri la unuaj BEToj, verkado de Harold Brown. La prelegoj vekis demandojn, sed tiujn oni devis ŝpari

ĝis la fino de la prelegaro, kiam ili jam malaktualiĝis kaj la diskutemo velkis. La gvidanto ne volis interrompi la prelegantojn, kaj tial la tempo ne egale dividiĝis inter ili.

Okazis lingvokurso por komencantoj, kie instruis i.a. Stela Kilk, 20-jarulino studanta kuracistan sciencon en Tartua ŝtata universitato. Aldone al la 8 gejunuloj de “Animo” la kurson partoprenis kelkaj pli aĝaj BET-anoj. (Cetere, Stela Kilk respondecis pri la tuta junulara programo: matena gimnastiko, ekskursoj kaj distraĵoj.) Apud la lingvostudejo en la 4a etaĝo de la lernejo viziteblis sufiĉe abunda Libroservo, tamen mankis la libroj de la rubriko “Laste aperis”. Pri tiu ne kulpas la libroservisto sed la eldonistoj, kiuj ne disponigas ekzemplerojn senpage; male la internacia lerniga E-revuo Juna Amiko ofertis multnombrajn senpagajn ekzemplerojn, kiuj rapide elĉerpiĝis.

La libroservistino kunhavis ampleksan kaj varian kolekton de E-emblemoj. En tria ĉambro oni povis bilde konatiĝi kun diversaj birdospecioj, ties latinaj, estonaj kaj esperantaj nomoj, kaj rigardi poŝtkartojn de la urboj de ĉiuj UKoj 1905-2006.

### **Amatorarta konkurso Kannel**

La tradicio komenciĝis en la 1980aj jaroj, kiam jare pli ol 100 homoj – aŭ grupoj – konkursis pri scena arto (kantado, instrumenta muziko, aktorado, dancado, deklamado, memverkita poezio), afiŝoj, ekspozicioj, manlaboroj. Nun la organizantoj de BET deziras revivigi la konkurson por konatigi diversnaciajn kulturajn valoraĵojn, evoluigi amatorartadon, eduki estetikajn kapablojn, stimuli verkadon kaj komponadon, progresigi lingvokonon kaj praktikan uzadon de Esperanto. La nunaj branĉoj estas kantado (sole aŭ ensemble), deklamado, aktorado, verkado kaj komponado.

Nun konkursis deklamantoj kaj verkintoj de poeziaĵoj, kantanto, la gitarista ensemblo “Animo”, pianoludanto. Ĉiuj ricevis diplomon, libropremiojn, kaj la plej bonaj konkursantoj estis

premiitaj per medaloj. La unua premio pro memverkita poeziaĵo estis aljuĝita al Anja Karkiainen pro ŝia lerta rimaĵo "Kien iris Väinämöinen?" La organizantoj ege volas instigi amatorojn partopreni la konkurson.

### Konklude

BET estas valora esperanta tradicio, sed ĝi ŝajnas esti ne sufiĉe konata ekster orienta Eŭropo, kie ĝi antaŭe estis eĉ furora. Ĝi miniature similas al Universala Kongreso, estante tamen malpli ampleksa kaj multe pli malmultekosta. Iu el la partoprenintoj de BET42 diris, ke ĝi similas al familia festo. La etoso estas amika, eĉ en la konkurso ne timiga. La libervolaj organizantoj laŭdinde laboras farante sian eblon por krei plezurigan kulturan, turisman kaj distran eventon, kiu meritas la atenton de la internacia esperantistaro. En 2007 BET okazos en Litovio.

*Saliko*



*Stela provis antikvan ĉaron en muzea bieno.*

## La poemo premiita en Kannel

Jen mia malnova versaĵo, kiu ĝis nun aperis presita (kun traduko en la finna) nur en antologio "Suomalaisella mitalla, Kalevalan poljennolla". Rimarku, ke mi evitis vortojn kun ĉapelitaj literoj.

La versaĵo estis premiita en Kannel-konkurso en la ĉi-jara BET.

*Anja Karkiainen*

### Kien migris Väinämöinen?

*Dum veturis Väinämöinen  
el Finnlando forirante  
sian genton postlasante,  
kie ektrovis li hejmon?  
Kie restas maljunulo?*

*Eble Esperantolande,  
en medio multkultura,  
kiu por la kantemulo  
ejo estus konvenega!*

*Jen ne mankas verkemuloj  
sed abundas versfarantoj,  
kiuj sur kvin kontinentoj  
same kantas kaj poetas.*

*Tial verko esperanta  
tuje trovas komprenantojn  
kie ajn en vasta mondo  
sendepende de nacio.  
Tradukadi ne necesas,  
kaj ne nepras interpreti.*

*Estus do neniom strange,  
se maljuna Väinämöinen  
siajn versojn verve kantis  
per kantel' akompanante  
inter samideanaro  
alfidanta vortpotencon.*

## Irja Klemola (1898-1995) – gvidantino el Turku

Juna studentino Irja Klemola partoprenis en la jaro 1920 kurson de Esperanto en Helsinko, kie ŝi studis matematikon, fizikon kaj kemion en la loka universitato. Sekva etapo estis la 14-a Universala Kongreso de Esperanto en la ĉefurbo de Finnlando. Ek de la jaro 1926 ŝi instruis en la Knabina Lernejo de Turku ĝis sia emeritiĝo en 1959. Tiu tempo estis plenplena da lerneja laboro kaj ĝi ne donis eblecon al aktiva agado en la Esperanto-movado.

En la sesdekaj jaroj emerita rektoro jam estis libera ekagi por la Internacia Lingvo. Nova kampo atendis sian plugonton. Fondiĝis 1961 nova Esperanto-societo en Turku. Prezidantan martelon ŝi forte tenis en sia mano 1962-1966. Poste sekvis Esperanto-Asocio de Finnlando, kiun ŝi gvidis 1966-1973. En ambaŭ asocioj ni proksime kunlaboris. Ŝi estis la prezidanto, mi la sekretario. La 54-a UK en Helsinko 1969 estis proksima al la koro de Irja Klemola, kiu en la Loka Kongresa Komitato okupis la seĝon de vicprezidanto.

Estis krome ankaŭ kelkaj aliaj movadaj taskoj. Kun entuziasmo kaj forto matematika instruisto ĵetis sin por respondi pri gravaj laboroj. Oni invitis ofte eksterlandajn gastojn, por kiuj nia konata aktivulino organizis prelegvizitojn. Sveda profesoro, fama lingvisto Björn Collinder faris 1964 paroladon en publika festo kun multnombraj partoprenantoj. Sukcesan turneon en kelkaj finnaj universitatoj plenumis 1971 profesoro Ivo Lapenna el Londono. En tiaj aranĝoj ŝi portis la torĉon, por ke ankaŭ eksteruloj eksciui pri la okazintaĵoj. Estis multaj similaj prelegvizitoj. En 1975 profesoro Humphrey Tonkin venis al Finnlando. Ĉiam nia finna veterana korifeo finance helpis la realigon de tiuj ĉi entreprenoj. Kelkfoje ŝi helpis reprezentantojn de



*Fonto: EF 1/1968. Originala fototeksto:  
“Sinjorino Klemola en sia rektora laborejo, kiun virinece beligas floroj.”*

Pola Esperanto-Asocio dum iliaj informaj vizitoj.

Finnaj kaj eksterlandaj organizaĵoj alte taksis ŝian neanstataŭigeblan laboron. Irja Klemola fariĝis honora membro de EAF, UEA kaj ILEI. Iuj vidpunktoj atestis, ke ŝi estis modesta, al kiu ne plaĉis belaj vestoj kaj inaj plibeligaĵoj. Hararanĝo devis esti simpla sen artefaritaĵoj. Kiam adoptita filino junaĝe en la familio kaŝe preparis buklojn, senkompatie tia mizerulino, mia estonta edzino, estis devigita meti sian kapon sub fluantan akvokranon. Postulema ŝi estis, kelkfoje eĉ troe, sed ĉiam amike rilatanta kun sampensumuloj. Movadajn disidentojn finna prestiĝulino ne favoris kaj tial kelkfoje ekestis probleme tiklaj situacioj. Pri difektoj en la movado ŝi ĉi tiel esprimis sin en intervjuo okaze de sia 70-jariĝo (EF 1/1968) “Jes, kompreneble, tiaj ĉiam ekzistas en ĉiu movado. Mi uzas nun la esprimon de

## Jam la 9-a eldono de la Zamenhofa Hamleto

”Hamleto, reĝido de Danujo” aperis en sia naŭa eldono ĉe UEA sojle de la Florenca UK. Tiu verko de William Shakespeare estas unu el la plej famaj dramoj en la monda literaturo kaj ĝia Zamenhofa traduko estas la unua granda mejloŝtono en la evoluo de Esperanto kiel literatura lingvo. D-ro L.L. Zamenhof aperigis fragmenton de sia traduko jam en 1893 kaj la unua eldono de la plena traduko aperis en 1894, nur sep jarojn post la apero de la Unua Libro.

La nova eldono konsistas el represo de la 8-a eldono el 1964, kiun editoris akademiano D.B. Gregor. La 8-a eldono fidele redonis la originalan Zamenhofan tradukon laŭ la unua eldono, forigante la ŝanĝojn, kiujn en ĝia 2-a eldono enkondukis de Beaufront, verŝajne sen konsento de Zamenhof, kaj kiuj restis ankaŭ en postaj eldonoj. Tre valoraj kaj prilumaj estas la enkonduko kaj piednotoj de Gregor. Novaĵo en la 9-a

eldono estas la postparolo de la gvida Esperanta ŝekspirologo Humphrey Tonkin. En la unua parto de sia eseo Tonkin analizas kaj interpretas la dramon mem kaj en la dua parto prezentas ĝian signifon el la vidpunkto de la lingva evoluo de Esperanto.

”Hamleto” estas la tria verko de Ŝekspiro lastatempe eldonita de UEA. En 2003 aperis ”La vivo de Henriko Kvina” kaj ĉi-jare ”La vintra fabelo”, ambaŭ esperantigitaj de Humphrey Tonkin. Ankoraŭ havebla estas ankaŭ ”La tragedio de Reĝo Lear”, kiun UEA eldonis en 1966 en traduko de Kolomano Kalocsay. Menciindas, ke ”Hamleto” estas aĉetebla ankaŭ en la pli moderna traduko de L.N.M. Newell, kiu aperis ĉe Stafeto en 1967 sub la nomo ”Hamleto, princo de Danujo”.

*(el komuniko de UEA prenis mm)*

juna japana fraŭlino, kiu antaŭ kelka tempo vizitis nian landon: inter niaj rondoj ekzistas, tiaj kiuj sin nur amuzas per Esperanto. Eble en niaj rondoj estas ankaŭ tiaj, kiuj ne laboras por nia celo, sed por si mem. Sed la plej multaj inter ni modeste kaj sin mem forgesante laboras laŭ siaj eblecoj, donas siajn fortojn kaj tempon kaj trovas novajn ideojn kaj eblecojn por la movado.”

Emerita tempo de Irja Klemola daŭris 36 jarojn. Ofte ŝi partoprenis Universalajn Kongresojn. Ĉiam nia honora membro de UEA revis pri vojaĝo al Ĉinio. Trajnveturo tra Siberio estis tro longa kaj laciga en alta aĝo. Neniam ŝi kuraĝis eniri aviadilon. Tial tiu ĉi menciita revo ne realiĝis. La nacia kaj internacia movadoj multon ŝuldas al la finna veterano, kies karesnomon ”Avinjo” ĉiuj konis. La cerba maŝinaro de aktiva pioniro en Turku bone funkciis ĝis la fino. Ŝi



mortis 97-jara en la loka hospitalo de Kaarina la 13-an de novembro 1995.

*Jorma Ahomäki*

## Anja Karkiainen denove premiita

En belartaj konkursoj de UEA en la branĉo de kantoj estis juĝita 2-a premio por Anja Karkiainen (Finlando; teksto) kaj Tarcísio José de Lima (Brazilo; muziko) pro "Multe pli ol simpatici" kaj pro "Oraj horoj". 1-a kaj 3-a premio en la branĉo restis ne aljuĝitaj.

1-ajn premiojn en aliaj branĉoj ricevis jenaj: **Poezio:** Francisco Javier Moleón (Hispanio) pro "Sed tiam" kaj Christian Rivie're (Francio) pro "Kvankam silenti"; **Prozo:** Paul Gubbins (Britio) pro "Nia paradizo bonvenigas"; **Eseoj:** Aleksandr Melnikov (Rusio) pro "Ekparolu por ke mi vin vidu – aŭ ĉu esperantisto rekoneblas laŭ paroloj"; **Infanlibro de la jaro 2005:** "Arne, la ĉefido" de Leif Nordenstorm (Svedio).

*(el komuniko de UEA redaktis mm)*

## Herzberg oficiale "Esperanto-urbo"

Laŭ la decido de la urba konsilantaro, la germana urbo Herzberg nun oficiale uzos la titolon "Herzberg am Harz – die Esperanto-Stadt", por diskonigi sin en la mondo. La oficiala leterpapiro surhavas ankaŭ esperantlingvan version: "La Esperanto-urbo". La voĉdono en la urba konsilantaro okazis marde la 11-an de julio, kaj neniu el la deputitoj de la kvar partioj en la konsilantaro kontraŭis ĝin. Tri el la deputitoj sindetenis en la voĉdonado.

Jam de iom da tempo esperantlingvaj oficialaj vojmontriloj montras al la loka Esperanto-Centro. Krome Esperanto estas uzata en la ĝemelurbaj kontaktoj kun Góra en Pollando. Esperanto-arkivejo funkcias en la malnova urbodomo, kaj partatempa dungito de la urbo zorgas pri aferoj kun rilato al Esperanto. Krome la urbo provizas senpage aŭ tre favorpreze ejojn por Esperanto-kursoj, konferencoj, kunsidoj, renkontiĝoj kaj koncertoj.

La nova Esperanto-urbo Herzberg situas en suda parto de la ŝtato Malsupra Saksio (Niedersachsen). En la urbo estas proksimume 15 000 loĝantoj. Ekzistas ankaŭ alia urbo kaj du vilaĝetoj kun la nomo Herzberg en Germanio, tial la Esperanto-urbo ofte estas nomata Herzberg am Harz.

*(el Libera Folio koncizigis mm)*

## 9a Internacia Fotokonkurso

Post ok sukcesaj konkursoj "La Ondo de Esperanto" invitas al naŭa Internacia Fotokonkurso. Rajtas partopreni ĉiu fotemulo, unu persono per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 15×20 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj.

La fotoj devas esti senditaj unuekzemplere al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando) kaj atingi antaŭ la 1a de decembro 2006.

La konkursaĵoj devos esti subskribitaj per pseŭdonimo, en aparta koverto kunsendata slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso. Ne rajtas partopreni fotoj jam premiitaj au publikigitaj. Juĝkomisiono aljuĝos premiojn da kelkdek eŭroj kaj abonoj de La Ondo de Esperanto.

La rezulto estos anoncita en "La Ondo de Esperanto". La organizanto havos ĝis 31 dec 2008 ekskluzivan rajton uzi la ricevitaĵojn. Poste la publikigo-rajton havos kaj la organizanto kaj la aŭtoroj.

Finnoj plurfoje gajnis premiojn en la konkurso: Raita Pyhälä 3-an premion jare 2005 kaj laŭdajn menciojn kelkfoje; Harri Melasniemi 3-an premion jare 1999 kaj Irja Melasniemi laŭdan mencion samjare; Auli Vihermä 2-an premion jare 1998. Vidu en la retpagaro de "La Ondo": <http://www.esperanto.org/Ondo/Ind-fk.htm>

*(el komuniko kaj retpaĝaro de la konkurso redaktis mm)*

# **Esperantoevento kun multflankaj spertoj: de ŝtonepoko al orgenkoncerto**

## **Esperantotapahtuma kivikauden ja urkumusiikin hengessä**

**Aŭtunaj Tagoj en Haukipudas – Syyspäivät Haukiputaalla 16.-17.9.2006**

Hotelo Samantta, Välitie 1, 90830 Haukipudas

*Post la someraj aranĝoj nin atendas la interesaj Aŭtunaj Tagoj, kiujn Esperanto-societo de Oulu aranĝos kunlabore kun EAF en komunumo Haukipudas, ĉirkaŭ 20 km norde de Oulu. La ĉefa eventejo estas la hotelo Samant-*



*Preĝejo de Haukipudas*

*ta, kien eblas veni jam vendrede. Se vi ne ankorau aliĝis, faru tion tuj!*

*La priskribo de la programo estis jam en EF 3/2006. Jen la programo kun detala horaro, notu tamen ke etaj ŝanĝoj eblas. Certe la plej impona programero ĉi-foje estos la vespera orgenkoncerto, kiu estos malferma por la publiko. Legu pli pri la solisto Esa Toivola en aparta artikoleto.*

*Memoru ankaŭ aliĝi al Kierikki-ekskurso kaj mendi lokon en la aŭtobuso de Oulu al Haukipudas, kvankam tiujn pagojn ni kolektos surloke.*

Monipuolisen esperantokesän jälkeen meitä odottavat mielenkiintoiset syyspäivät Haukiputaalla, noin 20 km päässä Oulusta. Päivien järjestelyistä huolehtii yhteistyössä Suomen Esperantoliiton kanssa Oulun esperantoseura.

Ohjelman kuvaus oli jo edellisessä lehdessä, tässä tiedoksi päivien aikataulu, johon kuitenkin

kin voi tulla pieniä tarkennuksia. Eriytyisen kiintoisa ohjelmanumero on tällä kertaa yleisöllekin avoin urkukonsertti Haukiputaan kirkossa. Lue lisää konsertin solistista Esa Toivolasta erillisessä jutussa.

**M u i s t a k a a**

myös ilmoittautua Kierikki-retkelle ja bussikuljetukseen Oulusta Haukiputaalle ja takaisin. Maksu näistä peritään paikan päällä, mutta tarvitsemme tiedon osallistujista, jotta kaikki pääsevät mukavasti perille.

### **Sabato / Lauantai 16.9.2006**

7.45 *Buso el la stacidomo de Oulu al Haukipudas (post alveno de trajno je 7.27 el Sud-Finnlando).* Bussi Oulun rautatieasemalta Haukiputaalle (etelän yöjunan klo 7.27 saavuttua).

8.30 *Matenmanĝo en hotelo Samantta.* Aamiainen hotelli Samanttassa.

9.00-13.00 *Ekskurso al ŝtonepoka Kierikki-centro en Yli-Ii (aparta pago 20 e).* Retki Kierikin kivikautiseen keskukseen Yli-Iihin (erillinen maksu 20 e).

*En Haukipudas libera programo kaj informa elementa esperantokurso.*

- Haukiputaalla vapaata ohjelmaa ja esperanton alkeis- ja tutustumiskurssi.
- 12.30-14.00 *Tagmanĝo en hotelo Samantta.* Lounas hotelli Samanttassa.
- 14.15 *Malfermo de la tagoj. Prezentos sin la komunumo Haukipudas, Esperanto-societo de Oulu, kantado sub gvido de Olli Pajula.* Päivien avaus. Haukiputaan kunta ja Oulun esperantoseura esittäytyvät, Olli Pajula laulattaa.
- 16.00 *Kafo* Kahvi
- 17.00 *Konatiĝo al la preĝejo de Haukipudas kun pentraĵoj de Mikael Toppelius.* Tutustuminen Haukiputaan kirkkoon ja Mikael Toppeliuksen maalauksiin.
- 18.00 *Orgenkoncerto de Esa Toivola en la preĝejo.* Esa Toivolan urkukonsertti kirkossa.
- 20.00 *Vespermanĝo en hotelo Samantta.* Iltaruokailu hotelli Samanttassa.
- 21.30 *Vespera libera kunestado.* Vapaata yhdessäoloa.

### **Dimanĉo / Sunnuntai 17.9.2004**

- 8.00 *Matenmanĝo en la hotelo.* Aamiainen hotellilla.
- 9.00 *Matenpreĝo de KELF.* Aamuhartaus, järj. KELF.
- 9.30 *Osmo Buller rakontos pri UEA-aferoj.* Osmo Buller tuo terveisiä UEA:lta.
- 10.30 *Jubilea jaro 2007 de EAF.* *EAF-estraro prezentos la aranĝojn: i.a. jubilea tago 28.4. en Helsinki, festivalo Arta Lumo en Kuopio julie.* Suomen Esperantoliiton hallitus kertoo juhluvuoden 2007 tapahtumista: mm. pääjuhlapäivästä Helsingissä 28.4., Arta Lumo -festivaalista heinäkuussa Kuopiossa.
- 12.00 *Tagmanĝo* Lounas
- 13.00 *Konatiĝo pri kaptado de petromizoj.* Tutustuminen nahkiaisten pyyntiin.
- 14.45 *Fermo de la tagoj.* Päivien päätös
- 15.00 *Buso al Oulu.* Bussi Ouluun.

### **Aliĝo kaj kontaktpersonoj**

*Bonvolu sendi la aliĝilon al la EAF-oficejo de Helsinki aŭ se vi volas aliĝi rete, uzu la adreson eafmendoj@esperanto.fi.*

*Krome pagu la kotizon kaj AT-paketon al la konto de la Asocio uzante la referencnumeron (ĉi-foje kotizojn por Kierikki-ekskurso kaj por buso ni kolektos surloke). Notu, ke estas tre grave fari ambaŭ: kaj pagi kaj sendi la aliĝilon por ke ni organizantoj sciu, kion vi mendis kaj kiam vi alvenos.*

